# *Cabello ratifas ke parlamentaj elektoj okazos anta? fino de 2020.*




Karakaso, 18 jul (RHK) La prezidanto de la nacia asembleo konstitucia (ANC) de Venezuelo, Diosdado Cabello asertis ke la elektoj por restarigi la parlamentan povon, okazos anta? fino de la jaro 2020.

Dum sia televida programo, la gvidanto neis la eblecon alvoki elektojn prezidentajn kiel negocado de alproksimi?o kun la opozicio, raportis la informagentejo Prensa Latina.

Tiuj ?i deklaroj respondas al ?usaj deklaroj de la ministro pri eksteraj rilatoj de Hispanio, Josep Borrell, kiu menciis eblan alvokon al la urnoj en la intertrakto de la registaro kun la opozicio.

Pasintsemajne, oficialaj fontoj konfirmis la instaladon de konstanta negoctablo en Barbado, sidejo de la tria dialoga rondo inter la registaro kaj la opozicio kun la celo avanci pere de dialogo por eltrovi pacon por la lando.

---

https://www.radiohc.cu/index.php/eo/noticias/internacionales/196456-cabello-ratifas-ke-parlamentaj-elektoj-okazos-antau-fino-de-2020

# Radio Habana Cuba